

Probal Dasgupta

(retired from / emeritiĝinta el) Indian Statistical Institute, Kolkata

Pri eteta problemo en la Esperanta morfologio

Resumo: Iuj sufiksoj en Esperanto akceptas la intensigan (aŭ poremfazan) ripetiĝon: *problemeteto*, *polverero*. Aliaj sufiksoj ne estas ripeteblaj malgraŭ la ekzisto de facile alirebla interpreto: (a) **rusististo*, (b) **vazlavejejo* estas maleblaj vortoj, kiuj (se ili ekzistus) evidente signifus (a) homon kiu profesie studas rusistojn resp. (b) domon kie preskaŭ ĉiuj ĉambroj estas dediĉitaj al la vazlavado. Kion instruas al ni la diferenco inter la sufiksoj de la kategorio de *et*, *er*, kaj tiuj de la kategorio de *ist*, *ej*? En ĉi tiu referaĵo mi argumentas ke tiu diferenco fortigas la teorion de vortiloj (laŭ kiu vortojn la gramatiko formas el aliaj vortoj per vortiloj) kaj dementas la teorion de vorteroj (kiu imagas la ekziston de ia sintakso ene de unuopa vorto). Preter ĉi tiu komparado de la du teorioj – lige kun kiu mi prezentas kaj demonstros la strategi-ombran teoremon – mi surtabligas semiotikan karton, provante ŝanĝi la ludon ne nur por la morfologio de Esperanto, sed ankaŭ por ĝia sintakso.

Ŝlosilvortoj: Plen-Vorta Morfologio; intensiga ripetiĝo; Esperanto; strategi-ombra teoremo; morfologio; semiotiko

On a teeny-weeny problem in Esperanto morphology

Abstract: Certain Esperanto suffixes permit intensifying iteration: *problemeteto*, *polverero*. Other suffixes in this language do not allow it even where interpretability would not have been an issue: (a) **rusististo*, (b) **vazlavejejo* are impossible words, which (if they were to exist) would obviously mean (a) someone who professionally studies specialists in Russian studies and (b) a building in which most rooms are used for dishwashing, respectively. What are we to learn from the contrast between suffixes of the *et/er* type and those of the *ist/ej* type? In this paper I argue that this contrast supports the theory of word formation strategies (which has the grammar derive words from other words via such strategies) and is inconsistent with the theory of morphemes (which imagines a syntax operative within an individual word). Apart from advocating the former framework rather than the latter (in the context of this advocacy, I formulate and establish the strategy shadow theorem), I play a semiotic card, in a bid to change the game not just for the morphology of Esperanto, but for its syntax as well.

Keywords: Whole Word Morphology; intensifying iteration; Esperanto; strategy shadow theorem; morphology; semiotics

এসপেরান্তো পদাণুতত্ত্বের একটি অণোরণীয়ান সমস্যা প্রসঙ্গে

সারসংক্ষেপ: এসপেরান্তো ভাষায় কিছু প্রত্যয়ের তীব্রতাবোধক দ্বিরুক্তি হয়, যেমন *problemeteto, polverero* অন্যায় প্রত্যয়ের হয় না, যেসব দৃষ্টান্তে অর্থবোধের অসুবিধে নেই সেখানেও: (ক) **rusististo*, (খ) **vazlavejejo* অচল, যদিও শব্দগুলোর (অস্তিত্ব থাকলে) স্পষ্টতই অর্থ হত যথাক্রমে (ক) রুশবিদ্যাশিষ্যদের নিয়ে ব্যাপ্ত বিশারদ আর (খ) এমন ভবন যার অধিকাংশ ঘরেই বাসন মাজা হয়। *এত/এর*-জাতীয় প্রত্যয় আর *ইন্ত/এই*-জাতীয় প্রত্যয়ের প্রভেদ দেখে আমরা কী শিখতে পারি? বর্তমান প্রবন্ধে আমার প্রধান বক্তব্য হল, এই প্রভেদের সাক্ষ্য পদান্তরী নকশার ভাষ্যকে সমর্থন করে (যার মতে পদ থেকে পদান্তরে যাবার নকশার মাধ্যমেই যাবতীয় পদ নিষ্পাদনীয়), পদাণু বা মর্ফিমভিত্তিক ভাষ্যকে সমর্থন করে না (যার মতে পদের ভিতরে পদাণুর বাক্যাংশবৎ অস্থিতিতে অস্থিত)। প্রথম ভাষ্যটিকে প্রতিষ্ঠা করার চেষ্টা এ প্রবন্ধের একটি লক্ষ্য (সেই সূত্রে আমি **নকশার ছায়া উপপাদ্যের** উপস্থাপন আর প্রতিপাদন দাখিল করেছি), তাছাড়া আলোচনায় সংকেততত্ত্বের অবতারণা করে এসপেরান্তো পদাণুতত্ত্ব ছাড়িয়ে ওই ভাষার বাক্যতত্ত্বও এই উপস্থাপনের প্রাসঙ্গিকতা আছে বলে ইঙ্গিত করেছি।

চাবি-শব্দ: অখণুপদবাদী পদাণুতত্ত্ব; তীব্রতাবোধক দ্বিরুক্তি; এসপেরান্তো; নকশার ছায়া উপপাদ্য; পদাণুতত্ত্ব; সংকেততত্ত্ব

La plimulto da legantoj trovos la vorton *eteta* tute nekomentinda. Ĝi aperas en la efektiva lingvouzo. Sed la tasko de lingvisto estas levi demandojn ankaŭ pri fenomenoj kiuj pasas senrimarke antaŭ la okuloj de laiko.

La intensiga ripetado de radikoj

La memstara adjektivo *eta* en ampleksa gamo da aperoj egalvaloras al *malgranda* (neniu ja aŭdacus aserti ke ili estus absolute sinonimaj, sed ekzistas gradoj de egalvaloreco kiuj ne devigas tian konkludon). Tamen, la eblon intensige (emfazocelle) ripeti la elementon *et*, kaj do diri *eteta*, ne eĥas la ekvivalento *malgranda*. Neniu ja diras **malgrandmalgranda*. Ĉu ni konjektu ke tiu neuzateco ŝuldiĝas al la ĉeesto de *mal*? La konjekto ne helpas nin; eĉ en la lingvotavolo allasanta la poezian neologismon *pita*, oni ne trovas la pluformaĵon **pitpita*.

Sendube gravas noti ke iu ajn poeto leganta ĉi tiun artikolon kapablos tuj verki virtuozaĵon kiu ekzemplas la vorton *pitpita*. Tia fortostreĉo demonstrus ion kion ni jam scias. Nome, la lingvo ne rezistas **pitpita* same absolute kaj rigide kiel ĝi malebligas ripeti la elementon *ĉi* en la esprimo *ĉi tie*. Emfazi la proksimecon de iu loko al la parolanto ne eblas per gramatikeraj rimedoj en nia lingvo (nek en aliaj lingvoj, kiom mi scias). Esperanto rigide kaj absolute malrajtigas nin diri **ĉiĉi tie* kun ripeto de *ĉi*, aŭ diri **ĉiege tie* kun apliko de la

intensiga afikso *eg*. La sola eblo estas esprimi la ideon per priskribaj vortoj kiel “en loko treege proksima al mi”.

Nia ĉi-foja tagordo fakte ne rilatas al *ĉiĉi, nek al *ĉiege. La temon de ilia malakceptebla ni tuŝas nur kiel kontrastan al tio ke Esperanto ne tiom absolute rezistas la vorton *pitpita. Tamen oni iomete cerbumu pri la statuso de tiu ne plene tabua *pitpita. Se la polemikema poeto imagata de ni perverse deklaras la vorton *pitpita* uzebla en escepta verso nur por spiti la gramatikiston, gravas rimarki ke eĉ en tia polemikcela fortostreĉo nia insistema poeto plene malsukcesas enŝovi en serioze fasonitan version la vorton *malgrandmalgranda. Tamen, *malgrandmalgranda havas la saman skeman dismeton kiel *pitpita: adjektiv-adjektiv-A. El kio do fontas la malsamgrada uzeblo de la du ripetajtoj eĉ en la perversa ekzerco de nia disputema poeto?

Ni konjektas ke tiu diferenco ekzemplas pli fundamentan econ de la fenomeno de intensiga ripetado en Esperanto. Nome, tio ripetata ne rajtas esti pli ol unuradika. La plej tipaj vortoj *plenplena* kaj *finfine* povus instigi nin proponi la eĉ pli mallarĝan tezon ke la lingvo allasas la elekton nur de unusilabaj radikoj. Mi tamen hezitus pri tia tezo. La legantoj bonvolu atente reagi al jena frazo. – *La infanoj tute ne emis serioze lerni la sporton; la tutan tempon ili insiste volis nur ludlude, petolpetole manipuli la pilkon.* – Al mia orelo, ĉi tie la vorto *petolpetole* ne sonas malkongrue al la spirito de la lingvo, dum vortoj kiel *malgrandmalgranda kaj *senĝensenĝene draste malharmonias kun ĝi.

Mi koncedas ke la fonologia formo estas inter la ŝlosilaj faktoroj. Eĉ ne mia allasema orelo akceptas *epizodepizode apud *fojfoje*. Sed la oreloj esperantistaj estas konsternaj diversaj. Tial mi dubas ĉu ni iam sukcesos distili el la fonologiaj intuicioj taŭgan formulon. Estos malfacile alveni al konverĝo inter diversfonaj uzantoj de la lingvo ĉi-rilate. Ni ne perdu tempon strebante rigore specifi fonologian limon kiu nete disigus la senĝene akceptatajn intensigajn ripetadojn disde la nepre rifuzataj. Sufiĉas simple agnoski la ekziston de fonologiaj faktoroj, kaj ke malfacilas pliprecizigi ilin.

Provizore, do, ni alvenas al la hipotezo ke Esperanto allasas la intensigan ripetadon de iasence “malpeza” radikoj.¹ Ni do identigas la adjektivan *eteta* kiel ekzemplon de tiu fenomeno: ĉi tie la elemento *et* kalkuliĝas kiel radikrole funkcia afikso.

Ĉu tamen havas senco apliki tiun analizon al *problemeteto* kaj *polverero*? Por simpligi la diskuton, ni supozu ke la vorto *polverero* por neniu uzanto de Esperanto portas la senco “konsistero de konsistero de polvo,” sed ĉiam

1 Atentu ke tiu priskribo de la fenomeno ankoraŭ ne ricevis universalan agnoskon. Kalocsay kaj Waringhien (1985: 417, paragrafo 315), ekzemple, asertas ke *plenplena* havas la teorian strukturon “plena je pleno.” Sed mi fidas al la prudento de la hodiaŭaj esperantologoj. Pli aŭ malpli baldaŭ ili agnoskos la intensigan ripetadon.

senescepte signifas “minimumega konsistero de polvo.” Kun tiu supozo, ni serioze demandu nin ĉu la ĉi-supra analizo senplie ampleksas la faktojn pri la intensiga ripeto de *er* en *polvero* kaj de *et* en *problemeteto* aŭ ĉu necesas ion apartan diri pri la afiksa tereno.

Du aliroj al afiksoj: la vortera kaj la vortila

Mi iam skribis ke “la strukturismo estas la lingvistiko de la burokrata racio”. Tiu esenca trajto de la strukturismo nete manifestiĝas en tiudoktrinaj teorioj – pri ĉiaj lingvoj, ne nur pri Esperanto – kiuj rigardas vorton kiel kunfliktaĵon de *vorteroj* (por tiu koncepto oni kutime uzas la terminon *morfemoj*). Analizoj vorterismaj ekiras de la premiso ke radikojn kaj afiksojn ni egalrange kalkulu kiel vorterojn, same kiel ni traktas vokalojn kaj konsonantojn senhezite kiel du subklasojn ene de pli vasta klaso nomata “sonoj.”

Al multaj legantoj estos nova la konstato ke ne ĉiuj lingvistoj akceptas tiun premison. Unu el la vorterismo-rezistaj (miavidpunkte “malburokrataj”) teorioj – nomata la *substancisma* (Dasgupta 2011) – adoptas aliron kiu laboras per *vortiloj*. Ekzemple, tiu aliro diras ke per la vortilo *Xo/Xisto* “*vendanto de Xo(j)*” klariĝas vortoparoj kiel *frukto-fruktisto*, *floro-floristo*, *legomo-legomisto*, dum per la vortilo *Xismo/Xisto* “*ano de Xismo*” eblas klarigi parojn kiel *socialismo/socialisto*, *komunismo/komunisto*, *faŝismo/faŝisto*. La vortera skolo devas elspezi pli da peno por specifi ke la *Xismo*-vortoj kaj la *Xisto*-vortoj parencas inter si. En la vortila analizo, tiun sisteman interrilaton senkoste deklaras jam la vortilo mem.

Iuj esperantistoj miras aŭdi ke laŭ mi eĉ por Esperanto necesas morfologia analizo bazita sur la vortila aparato. Ili skeptike demandas: kiel do la vortila teorio klarigu la fakton ke en nia emfaze logikema lingvo pluraj afiksoj ludas la rolon de plenrajtaj vortoj?

Tiu demando tamen fakte rilatas al fenomeno ege pli malsimpla ol pensas tiuj el ni kiuj ne studis ĝin. La leganto bonvolu iri al Schubert (1989: 267). Rimarku ke eĉ lia vorterisma analiza kadro devas fleksi plurajn muskolojn por povi trakti la kontraston inter simpla apliko de la afikso /ar/ en *kompararo*, “fasko da komparoj,” kaj la uzo de la memstara vorto *aro* kiel dua konsistero en la kunmetaĵo *komparoaro*, “referenca aro kun kiu oni komparu aliajn kandidatojn” – vorto kunmetita el du substantivoj. Schubert plene konscias ke la vortopa uzo de iuj niaj afiksoj estas speciala fenomeno, situanta en tute aparta niĉo de nia lingvo kaj bezonanta zorgajn, atentajn klarigojn. Kvankam la vortila teorio kapablas ilin trakti same bone kiel la vortera, tamen la taskon analizi tiujn centaŭrojn ni ne metas sur la tagordon

de la nuna referaĵo. Ili ne rilatas al la intensiga ripeto, la fenomeno studata ĉi tie.

Survoje al analizo de la intensiga ripeto, ni petas vian indulgon dum kelka tempo. Ni unue dismetos la aparaton de vortiloj kaj montrons kiamaniere derivi el ĝi teoremon nomatan la strategi-ombra teoremo. Tiu rezulto metos la vortilisman teorion en avantaĝan pozicion kompare kun la vorterisma por la sinengaĝo kun la fenomeno de intensiga ripetado.

Formale dirite, nia ĉi-supra ekspresa indikstilo malkongruas kun la tasko rigore prezenti la vortilojn. Ni nun reformulos ilin laŭ la plej lasta redakto de la aparato substancisma. Inter la ĉi-supre menciitaj, la unua vortilo estas formulenda jene, kiel VFS (Vort-Farada Strategio) 1 (la indico Subs estas mallongigo por “substantivo”):

$$1 [Xo]_{\text{Subs}} \leftrightarrow [Xisto]_{\text{Subs}}$$

Ĝi traktas parojn kiel *frukto-fruktisto*, *floro-floristo*, *legomo-legomisto*. VFS 1 eksplike formulas nur la forman aspekton de la interrilato inter la du membroj de tia paro. Sed la teorio tezas ke tiu aspekto intime ligiĝas kun la senca. Al la eksplica parto de VFS 1 aldoniĝas suplementa specifo pri semantika rilato neformale kaj proksimume esprimebla per la deklaro ke oni rajtas glosi vorton *Xisto*-formatan kiel “vendanto de Xo(j).”² Atentu ke la gramatikan rilaton inter la vortileroj (inter la skemaj formuloj situantaj dekstre kaj maldekstre de la sago) jam tute formale esprimas la kategoriaj/subkategoriaj indicoj (ĉi-ekzemple ni hazarde trovas ambaŭflanke nur la indicon Subs, mallongigo por Substantivo; sed se ni tradukus en la VFS-formaton la vortilon por *tajpi/tajpisto*, *verki/verkisto*, *instrui/instruisto*, tie la maldekstra vortilero portus la indicon V = Verbo).

Jen la rigora formo de la dua el la pli frue menciitaj vortiloj, VFS 2:

$$2 [Xismo]_{\text{Subs}} \leftrightarrow [Xisto]_{\text{Subs}}$$

Tiu ĉi strategio rilatas al paroj kiel *socialismo/socialisto*, *komunismo/komunisto*, *faŝismo/faŝisto* kaj esprimas semantikan rilaton proksimume formuleblan per la deklaro ke oni glosu vorton *Xisto*-formatan kiel “ano de Xismo.”

Unu-du ekzemploj liveras nur enkondukan ekkonon de la teorio. Nur neformale ni nomas ĝin la “vortilo” aliro; ĝi fake nomiĝas la Plen-Vorta Morfologio, PVM, pro tio ke ĝiaj tezoj funkcias senescepte nur per interrilatoj de unu plena vorto al alia plena vorto, tute sen postulatoj pri vorteroj (gramatikaj elementoj el kiuj konsistus vorto). Vi trovas ĉi-sube, ĉe 3a-f, la difinojn sur kiuj bazas sin la formala aparato de la teorio. Legantoj kiuj ne estas mem

2 Por ke eblu meti tiun semantikan suplementon sur la ebenon de formalaj specifo necesus pli vaste, interskole, akceptita notado por la sencoj, sed tia notado ankoraŭ ne ekzistas.

morfologoj bonvolu ignori la detalojn kiuj aspektas al ili tro formiknivele pedantaj.

3 Por ke iu lingvo L subtenu iun Vort-Faradan Strategion VFS, necesas ke minimume du paroj da vortoj en L ekzemplu precize paralelajn sonajn kaj sencajn kontrastojn; oni formaligas ĉiun VFS per jena strategiŝablono, kies funkciadon regas la specifoj 3a-f:

$/!X!/_\alpha \leftrightarrow /!X!/_\beta$, kie

a) $/!X!/_\alpha$ kaj $/!X!/_\beta$ skeme esprimas po unu vorton;

b) $!X!$ kaj $!X!$ (legataj kiel “simbola ikso kaj simbola ikso-primo”) estas skemoj kiuj simbolas vortoklasojn apartenantajn al kategorioj kiujn specifas la trajtoj (resp. trajtaroj) α kaj β ;

c) la primo (') simbolas la formajn diferencojn inter $/!X!/_\alpha$ kaj $/!X!/_\beta$ kiujn ne pritraktas la aŭtomata fonologio (termino fake difinita en la Genera Fonotaktiko), dum la simboleco-markilo $/!...!/_$ montras distingon inter la abstrakta, teoria uzo de “ X ” en ĉi tiu difino kaj la konkreta, priskriba uzo de “ X ” por signi tiun aŭ alian variilon en tiu aŭ alia VFS;

d) la notilo \leftrightarrow simbolas dudirektan implicon;

e) la interpreto de $/!X!/_\alpha$ estas semantika funkcio de $/!X!/_\beta$ kaj inverse;

f) la enhavo de la primo (') povas esti nula se kaj nur se $\alpha \neq \beta$.

Nun ni estas pretaj spekti la derivadon de grava teoremo el ĉi tiu aksioma bazo.

La strategi-ombra teoremo kaj iuj ĝiaj sekvoj

Lampo prilumas grandan regionon ĉirkaŭ si, sed priombas regioneton sub la fizika portanto de la lumilo. En iuj kulturoj oni tial parolas pri la “ombro sub la lampo.” Simile, ĉiu VFS prilumas, klarigas, vastan aron da vortoparoj, kaj ebligas per la dudirekta sago ekiri de la maldekstratipa parano al la dekstratipa, aŭ inverse, por tiu vasta aro prilumata; sed parenca al tiu prilumado estas la ombro kiun la VFS ĵetas sub sin. Kia do estas tiu afero, nomota ĉi tie “strategi-ombro?” Kaj pro kio mi parolas pri “strategi-ombra teoremo?”

En nia stranga mondo de aŭtoritatemaj gvidantoj kaj progresdetruemaj movadoj, ni povas bedaŭrinde facile imagi ke iu socio restarigas la sklavkomercon (antaŭ unu-du jardekoj tute maleblis imagi tian malprogreson, kaj estas forte esperinde ke pro la klopodoj nun okazantaj denove, post iom da tempo, ni sukcesos denove instali tiun neimageblecon; sed, dume, mi uzas la gramatikan terenon por tiri vian atenton al tiu malagrableco de nia nunto). Mi do petas vin konkrete imagi merkaton en kiu homoj vendas kaj aĉetas sklavojn. Rafinante la detalojn de tiu bildo, pluiru kaj imagu homon kiu elektas vendi ne senspecifajn sklavojn sed komercistojn – ekzemple, fruktistojn aŭ floristojn.

Nun starigu al vi lingvan demandon: ĉu en tiu groteska bildo vi pretas nomi viajn tre specialajn sklavkomercistojn **fruktististoj* aŭ **florististoj*, pro tio ke ili vendas vendistojn de fruktoj aŭ de floroj? Vi konstatas ke ankaŭ al via orelo tiuj vortoj estas steletitaj, plene malakcepteblaj, ĉu ne? Jen do la empiria bazo de la strategi-ombra teoremo.

Luj legantoj sendube trovos la ekzemplon estetike horora kaj eĉ morale ofenda. Por ili mi liveras duan ekzemplon. Ekzistas vortilo *Xo/Xano* (de kiu mi ne prezentas la rigoran formulon, oni scipovos mem verki ĝin) por la vortoparoj *klubo/klubano*, *societo/societano*, *familio/familiano*. Sed atentindas ke – ankaŭ kiam unu institucio (ekz landa asocio) membras en pli granda institucio (ekz tegmenta moda asocio) kaj nia ekzempla persono estas ano de la konsistera organizaĵo (ano de la landa asocio) – nia lingvo tamen ne permesas al ni diri la elstarigitajn vortojn en: “La tegmenta asocio Sfinkso havas kiel membron la landan, kiu do estas sfinksano, kaj vi, estante individua membro de tiu sfinksano, estas tial *sfinksanano*.” La vorton “**sfinksanano*” ni simple ne rajtas formi. Notu ke la fenomeno ne estas fonologia. Ŝtatanoj de Pakistano kaj Irano nomiĝas *pakistananoj* kaj *irananoj*. Pasaĝero vojaĝanta en kongresa karavano nomas sin *karavanano*. Esperanto ja ne evitas ripetigon de silabo. La malebleco de **sfinksanano* kaj **fruktististo* estas fakto morfologia, ne fonologia.

Pri tiu fakto respondecas la strategi-ombra teoremo, kiun ni nun derivos el la aparato montrita en la dismeto 3, jam prezentita en la ĵusa sekcio.

Zorga leganto de la dismeto 3 rimarkos ke ĉiu strategiformato $/!X!/_\alpha \leftrightarrow /!X!/_\beta$ konsistas el du skemoj situantaj ambaŭflanke de la sago: la maldekstra skemo $/!X!/_\alpha$ kaj la dekstra skemo $/!X!/_\beta$. La lingvouzantoj, laŭ la teorio de la Plen-Vorta Morfologio, laŭbezzone aplikas tiun aŭ alian strategion (kaj kiel parolantoj kaj kiel aŭdkomprenantoj) por uzi unu skemon kiel bazon kaj ekiri de ĝi, pere de la dudirekta sago, al la aliflanka skemo en la sama strategio.

Tiun klarigon multaj legantoj trovos tro abstrakta. Jen do efektiva ekzemplo. Ni traktos la formalajn ŝtupojn ege malrapide, kaj riskos tedi vin;

bonvolu toleri; de la ŝtupaj detaloj dependos la strategi-ombra teoremo, kiun ni derivos por vi poste. – Imagu ke vi legas tekston en kiu aperas la vorto *hodiaŭano*, neniam antaŭe renkontitan de vi. Kiamaniere vi sukcesas ĝin kompreni? Per apliko de la strategio $/Xo/_{\text{Subs}} \leftrightarrow /Xano/_{\text{Subs}}$ de dekstre maldekstren. Alidire, vi unue prenas la pli informriĉan skemon, do ĉi tie la dekstran skemon $/Xano/_{\text{Subs}}$; vi ĝin surmetas sur la celtabulan vorton *hodiaŭano*, kiun vi tiumetode diagnozas kiel dekstraskeman ekzemplon de tiu konkreta strategio. Pro tiu diagnozo vi scias ke eblas nun apliki la strategion de dekstre maldekstren. Vi do aplikas ĝin tiudirekte, ekirante de la celtabula vorto *hodiaŭano*, kaj la sago vin portas al ĝia strategipartnero *hodiaŭo*. Nun vi konstatas ke la aŭtoro volas komuniki la nocion “homo apartenanta al la hodiaŭo” – do al la nuna epoko.

Se vi aŭdos pri landonomo nova por vi, ekzemple *Bervalo*, kaj por via tuj parolota frazo volos derivi el ĝi vorton por la landano, tiam via procedo funkcios en la inversa direkto. Mi ne volas tedmortigi vin, kara leganto; vi rajtas mem fari la plenan ekzercon por konvinki vin ke eblas sammaniere iri ekde *Bervalo* al *bervalano*. En la ŝlosila ŝtupo vi, malsukcesinte surmeti la pli informriĉan skemon $/Xano/_{\text{Subs}}$ sur la celtabulan vorton *Bervalo* (pro la evidenta malkongruo – en *Bervalo* ja ne enestas la fonemsinsekvo *an*), estas do devigata surmeti la skemon $/Xo/_{\text{Subs}}$ sur la celtabulan vorton *Bervalo* kaj ekpretas apliki la strategion de maldekstre dekstren.

Nun ni derivos por vi la strategi-ombran teoremon el la ĉi-supraj detaloj, pri kies tedeco vi nun pardonos min.

Konsideru la paron da vortoj *sfinkso* – *sfinksano*. Kiajn aplikojn de la VFS 4 al la unuopaj membroj de tiu paro rajtigas la algoritmo pene klarigita ĉi-supre? Jen eksplica prezento de la VFS, reliefiganta por vi la maldekstran skemon $/Xo/$ kaj la pli informriĉan dekstran skemon $/Xano/$:

$$4 [Xo]_{\text{Subs}} \leftrightarrow [Xano]_{\text{Subs}}$$

Vidante la celtabulan vorton *sfinkso*, la algoritmo unue provas surmeti sur ĝin la pli informriĉan dekstran skemon $[Xano]_{\text{Subs}}$, konstatas malkongruon kun la celtabulo (pro manko de la vosto *ano* en *sfinkso*), due provas surmeti la maldekstran skemon, sukcesas, kaj diras: brile, ni rajtas fari derivon de maldekstre dekstren kaj produkti la liveraĵon *sfinksano*.

La dua ebla procedo estas ke la algoritmo trafas la celtabulan vorton *sfinksano* kaj provas surmeti la pli informriĉan dekstran skemon $[Xano]_{\text{Subs}}$. Bonege, aperas perfekta kongruo. La algoritmo nun efektivigas derivon de dekstre maldekstren, akuŝante la vorton *sfinkso*.

Nun rimarku ke la algoritmo neniel rajtas uzi VFS 4 por surmeti la maldekstran skemon $[Xo]_{\text{Subs}}$ sur la celtabulan vorton *sfinksano* kaj de tie derivi

la pluan vorton **sfinksanano*! Kial ĝi ne rajtas tion fari? Ĉar tia apliko rompus la konvencion sur kiu baziĝas la tuta procedo – la konvencion ke oni devas unue provi la pli informriĉan el la skemoj. Kaj de kie devenas la sankteco de tiu kutima praktiko? De la principo ke, kiam ajn du reguloj aŭ rutinoj – unu pli larĝa kaj la alia pli mallarĝa – rivalas pri la traktado de iu celtabulo, la arkitekturo de la homa lingvo donas prioritaton al la pli mallarĝa. (Legantoj konantaj la juron rekonos ĉi tie ion paralelan al vaste konata jura principo same donanta prioritaton al la pli specifa el du konkurencantaj leĝoj.)

Vidu, ni ĵus derivis la strategi-ombran teoremon. Ĝuste la maleblo derivi vortojn kiel **sfinksanano*, **fruktististo*, **florististo*, **vazlavejejo* estas la empiria enhavo de tiu teoremo.³ Vi ĵus sekvis la ŝtupojn de nia demonstro ke tiu maleblo sekvas el fundamentaj formalaj ecoj de la arkitekturo de la morfologio. La unua paŝo survoje al la ĉeftemo de la referaĵo – la intensiga ripeto vidata en ekzemploj kiel *problemeteto*, *polverero* – estas simple klarigi kiamaniere tiuj derivaĵoj ĉirkaŭiras la strategi-ombran teorion por povi entute ekekesti.

Vi ja ne imagas ke efektive estos simple.

Kaj tamen aperas afiksaj ripetigoj

Por pluri sen konfuzoj, ni devas fari rigoran distingon inter la strategi-ombra teoremo kiel formala rezulto kaj la empiriaj faktoj lingvaj kiujn ni rigardas kiel konfirmon de tiu teoremo. Pro formalaj kialoj, la teoremo kiel fortika rezulto ja ne estas forgestebla. Se ni rimarkos iujn vortojn esceptajn – kiuj do ŝajnas empirie malkonfirmi ĝin – tiam ni devos fasoni por ili klarigon kiu konservas la teoremon mem kiel rezulton. Ne nur la fenomeno kiun ni baptis *intensiga ripeto* (vortoj kiel *problemeteto*, *polverero*) liveras tiajn esceptojn. Malpli esoterajn esceptojn ni renkontas ĉe *prapraavo*, *prapranepino*. Estas konvene komenci ĉe tiuj ĉi.

Por formale ebligi la ekziston de tiuj esceptaj vortoj, nia modelo Plen-Vorta Morfologio estas devigata, apud la evidenta strategio VFS 5 (respondeca pri la ordinaraj *praavo* kaj *pranepino*), proponi la specialajn kromstrategiojn VFS 6, 7 ktp. Ĉi tiuj ĉirkaŭiras la strategi-ombran teoremon, sed laŭ multekosta vojo kiu – ĝuste pro la efiko de la sama teoremo – por ĉiu pluderivaĵa nivelo kiel *praprapraavo* devas aldoni plian kromstrategion:

3 Oni memoru ke ne la manko de semantikaj interpretoj fortenas tiujn vortojn de la direbleco. Pri la semantiko de *sfinksanano*, *fruktististo*, *florististo* ni jam klarigis, surbaze de specifaj imagitaj kunteksto. Kaj evidente *vazlavejejo*, se la vorto ekzistus, signifus domon kiu enhavas grandan nombron da vazlavejoj.

5 $[Xo]_{\text{Subs}} \leftrightarrow [\text{pra}Xo]_{\text{Subs}}$

6 $[\text{pra}Xo]_{\text{Subs}} \leftrightarrow [\text{prapra}Xo]_{\text{Subs}}$

7 $[\text{prapra}Xo]_{\text{Subs}} \leftrightarrow [\text{praprapra}Xo]_{\text{Subs}}$

Se en ludo kun infanoj vi starigos la konvencion ke oni rajtu apud *antaŭhierau* diri ankaŭ vortojn en la serio *antaŭantaŭhierau*, *antaŭantaŭantaŭhierau* ktp, tiam morfologo okupiĝanta pri via lude larĝigita deriva sistemo devos starigi kromstrategiojn analogiajn al 6 kaj 7. Por ŝpari la spacon kaj la tempon, mi lasas la formuladon de tiuj kiel fakultativan ekzercon por vi.

Ni do konstatas ke por tajlori la formalan sistemon al escepte permesata afikso-ripetiĝo – kiu montriĝas empirie aperanta kaj do inkluzivenda en serioza priskribo de la faktoj – oni estas devigata enŝalti multekostan aparateron. Tiu ĉi paŝo kongruigas la modelon kun la fenomeno, sed neniel helpas klarigi la fenomenon mem. Se la homa lingvo principe ne volas ke la afiksoj ripetiĝu, kial do ĝi en iuj niĉoj allasas tiun malpreferatan fenomenon? Kion diri pri la koncernaj niĉoj?

Sundar Sarukkai (en persona komunikiĝo en 2008) komentis ke la esceptoj rimarkitaj de mi aspektas kiel importaĵoj el la matematiko en la homan lingvon, kaj ke en ĉiu tia escepto oni vidas ekzemplon de la principo ke la malekvacio $a > b$ ekvivalentas al la malekvacioj $a \gg b$, $a \ggg b$ ktp. Alidire, la escepto koncernas ĝuste tiajn operaciojn por kiuj validas diri ke duobligo, triobligo ktp de la operacia simbolo lasas la tutan formulon enhave senŝanĝa. Sarukkai sugestis ke – diference de la matematiko, kiu ne surmetas konotacian pluson sur la denotacian enhavon de la formuloj – la homa lingvo semiotike ekspluatas la eblon duobligi aŭ pliobligi la koncernan operaci-esprimon. Alie dirite, Sundar hipotezis ke la sistemo kiel pura aparato devas trakti la skemojn *praXo* kaj *prapraXo* kiel egalvalorajn. Ĝi do formale ne rajtas permesi tion kion ni empirie konstatas – nome tion ke *prapraavo* signifas patron de *praavo*, ktp.

Kial tamen la lingvaj denotacioj estas empirie tiaj ĉi?

Laŭ mia Sarukkai-inspirita priskribo, ene de la formala arkitekturo de la homa lingvo, la semiotiko aldonas konotacian pluson al la plurobla uzo de la afikso *pra*. La pluso tiel refraktas la sisteme liverotajn denotaciojn ke la homa lingvo (kies ĝeneralajn principojn Esperanto ĉi tie ekzemplas) ligas la vorton *prapraavo* kun la senco “patro de *praavo*,” la vorton *praprapraavo* kun “patro de *prapraavo*” ktp. Same estas pri la ripetiĝo de la prefikso *antaŭ* en la alia ekzemplo.

Pli frue mi nomis ĉi tiajn afikso-ripetojn “malesoteraj,” do malpli misteraj ol la intensigaj afikso-ripetoj ĉe *polverero* aŭ *problemeteto*, la temo kiun ni nun ekstraktos. Per la epiteto “malesotera” mi celis emfazi la fakton ke vortojn kiel

prapraavo aŭ *antaŭantaŭhieraŭ* la tradicia vorterisma teorio povas rekte klarigi sub la standardo de la senckunmetisma doktrino. Tiu klarigo atribuas onajn sencojn al la vorteroj kaj kombinas ilin per reguloj por liveri la kunmetajan sencan de la plena vorto. Male, tiu stilo de klarigado ne funkcias por *polverero*; ĉi tiu vorto por la plimulto el ni portas la sencan “tre malgranda polvo” kaj ja ne la senckunmetisme atendatan interpreton “ero de polvo.” Ĉe la vorto *problemeteto*, la vorterismo ne facile trovas metodon por sisteme kombini la kontribuojn de la du aperoj de *et* al la senco de la plena vorto.

Kial mi asertas ke la vortilismo pli bone fartas rilate al la nun diskutataj fenomenoj – la “esotera” intensiga afikso-ripetado ĉe *problemeteto*, *polverero* kaj la “malesotera” afikso-ripetado (“klasika,” ĉar kongrua kun la ortodoksa senckunmetismo) ĉe *prapraavo*, *antaŭantaŭhieraŭ*?

La aserton mi bazas sur la fakto ke la vorterisma doktrino pelas siajn uzantojn serĉi ian netan diferencon inter la esotera kaj klasika fenomenoj ĉe la vorteroj aperantaj en la du ekzemplo-faskoj. Tio signifas, konkrete, serĉi iajn distingajn ecojn ĉe la supozinde “esoteraj” afiksoj *er* kaj *et* – kiuj sur la koncernaj aksoj diferencu disde la supozinde “klasikaj” elementoj *pra* (afiksa) kaj *antaŭ* (prepozicia sed afiksrola). Se la vorteristoj ne eldetektivos trajto-identige priskribeblan kontraston inter la du vortero-klasoj el kiu eblos derivi la observeblajn efikojn, tiam ili sentos sin ĝenataj ne trovi solvo-ŝlosilon konforman al sia doktrino. Sekve, ili deklaras la problemon netraktebla.

Tian deklaron des pli rezolute subskribos tiuj vorteristoj kiuj krome rimarkos alian gravan fakton al kiu mi nun tiras vian atenton. Temas pri la fakto ke la “klasika” afikso-ripetado libere allasas tri aperojn (aŭ pli) de la ripetataĵo – ekz tute senbare formiĝas la vortoj *praprapraavo*, *antaŭ-antaŭantaŭhieraŭ* – dum la “esotera” fenomeno tion multe malpli volonte emas permesi. Oni apenaŭ, maloftege, nur per tre granda fortostreĉo permesas al si diri *???polvererero*, *???problemeteteto*, eĉ kiam oni deziras esprimi egan intensecon. Mi vetas ke neniu pretos atribui tiun ĉi kontraston inter la esotera kaj klasika versioj de la afikso-ripetado al iaj specifaj trajtoj ĉe kiuj la elementoj *pra* kaj *antaŭ* diferencus disde la elementoj *er* kaj *et*. Mi certas ankaŭ pri tio ke plilongigi la du elemento-listojn ne efikos detrue sur la ĵusan rezonadon. Sed estas via respondeco revizori miajn certojn. Al vi restas la agrabla tasko plenumi vian devon. Dume, la rezonado ĉi tie pluiros al la posta ŝtupo.

Kiamaniere la vortilismo sukcesas pli bone farti ol la vorterismo vide al tiaj fenomenoj?

La intensiga ripetado: fenomeno semiotika

Kaj la vortilismo kaj la vorterismo kongruas kun la kredo ke la intensiga ripetado ĝenerale estas temo semiotike alirenda. Nur la semiotiko havas taŭgajn laborilojn por priskribi la rilaton inter la kerno de la lingva strukturo kaj la ikonecaj fenomenoj situantaj sur ĝia periferio. La ripetado de radikoj en *plenplena, fojfoje, finfine* evidente estas tiukategoria fenomeno. Sendube neniu lingvisto senigus sin je semiotikaj laboriloj fronte al la kontrasto inter la ofta vorto *finfine* kaj la malebla vorto **vinvine* (en imagebla frazo kiel *Nepre celebru la okazon vinvine!*).⁴ Necesas apelacii al iaj principaj kriterioj por kompreni kial *fine* estas pli taŭga objekto ol *vine* por la intensiga ripetado. Nur la semiotiko liveras tiajn kriteriojn.

Tial, sen tuj lanĉi enketon inter trimil esperantistaj lingvistoj kaj fari statistikan analizon, vortilisto kiel mi rajtas apriorie supozi ke pli-malpli ĉiuj esperantologoj, eĉ la vorterista plimulto inter ni, pretas rigardi la intensigan ripetadon kiel semiotike pritraktendan ankaŭ ĉe *problemeteto* kaj *polverero*.

El tiu neceso enplekti la semiotikon, tamen, ni ne rajtas salti al konkludo pri foresto de gramatika dimensio en la analizo. Por pli klare kapti la konceptojn pri kiuj temas, konsideru la pluralon en la indonezia. La substantivoj en tiu lingvo formas pluralon per duobligo. De la singulara *lemari* “ŝranko” ni formas la pluralon *lemari lemari* “ŝrankoj.” Evidente ni havas aferon kun principoj semiotikaj ĉi tie. Nombrojn pli grandan ol unu la indonezia gramatiko esprimas ikonece, per du ekzempleroj de la substantivo (la sistemo donas al la nombro du la taskon reprezenti ĉiujn nombrojn pli grandajn ol unu). Ni devas tamen en la strukturan priskribon de la indonezia morfologio meti nian konstaton ke la duobligo de la substantivo funkcias kiel indikilo – semiotike motivita, sed tamen konvencia kaj do aparte lernenda indikilo – de la gramatika trajto *Pluralo*.

Alidire, kiam ni aŭdas *lemari lemari saya* “miaj ŝrankoj” en iu konkreta frazo *Lemari lemari saya tidak mahal* “Miaj ŝrankoj ne estas multekostaj,” ni ne hastu serĉi en tiu frazo semiotikan konotacion. Ni agnoskas ke faktoro semiotika motivas la uzon de la duobligo en la indonezia morfologio por esprimi la pluralon. Konsentite ke tiun angulon de la morfologio de tiu lingvo ni tial etikedas kiel malpli arbitran, pli motivitan, uzante la vortojn “arbitra” kaj “motivita” en la senco kiun ni heredis de la klasika strukturismo. Tamen la sintakso de nia frazo inkluzivanta ekzemplon de tiu uzo pure kaj nure enŝaltas la morfologion de la lingvo. La substantivan sintagmon en tiu banala indonezia frazo ni ja ne etikedu kiel suke ikonecan.

4 Ne volante tedi vin entekste, mi ŝovas al piednoto la taskon diri denove ke oni kompreneble permesus al si diri ion tian en marĝena situacio, ekster la gamo kiun la plimulto de la lingvouzantoj rigardas kiel normalan. Volante festi, homoj permesas al si petole elbuŝigi sufiĉe strangajn vortojn, kiujn la kunfestantoj same allaseme akceptas.

Pure kaj nure en nia antaŭjusa Esperanta frazo jes estis suke ikoneca; kaj grandioze ekzemplis la sukan ikonecon la ŝekspira frazo *Tomorrow and tomorrow and tomorrow / creeps in this petty pace from day to day*.⁵ Komprenu kial tiuj ripetoj (cetere bezonataj la konjunkcion kiel cementon) tuj kalkuliĝas ikonecaj en Esperanto aŭ la angla. Temas pri tio ke ĉi tiuj lingvoj, malkiel la indonezia, ja ne instalas semiotike motivitan morfologian rimedon por la pluraligo. Tial la rimedo de ripetado ne reduktiĝis al pasiva rutinaĵo en ilia gramatiko. Ĉi tiuj lingvoj do retenas tiun rimedon kiel semiotike aktivan disponaĵon rande de sia gramatiko. Ili tial povas libere enŝalti la sukan valoron de la elemento-ripetado.

La vojo de la referaĵo atingis punkton treege proksiman al la vortilisma solvo al nia ĉefdemando. Nia solvo situas inter la tute libera retorikaĵo aperanta en la Esperanta *pure kaj nure* kaj la plene mallibera gramatikaĵo konstatebla en la indonezia *lemari lemari*. Kiamaniere tio funkcias?

Por ke vi plene komprenu la formalan enhavon de nia hipotezo, mi propedeŭtike klarigu ke la VFS-aparato, kvankam ĝi preskaŭ ĉiam agas nur en la leksiko por trafiki inter la maldekstraskemaj kaj la dekstraskemaj vortoj, tamen esceptokaze – irante laŭ vojo ikoneca, semiotike motivita – foje plenumas siajn operaciojn realtempe, dum la formado de la dirota frazo. Ĉi tiun periferie situantan kapablon de la vortilisma arkitekturo mi pli frue uzis (Dasgupta 2003); interesigaĵoj estas petataj studi tiun referaĵon por revizori la sendependan empirian konfirmitecon de la nun uzota rimedo.

Jen do la solvo – tezi ke la esoteraj formoj ekzemplas la realtempan uzon de VFS 8 kaj 9 (kaj aliaj similaj strategioj):

8 [Xero]_{Subs} ↔ [Xerero]_{Subs}

9 [Xeto]_{Subs} ↔ [Xeteto]_{Subs}

Ĉiun strategion kiu rajtas tiel roli la aparato devas provizi per aparta bileto tiucela; mi ne proponas ĉi tie senbezonan notadon por la biletoj. Kiel ni jam vidis ĉe la malesotera ripetado (bv reiri al VFS 5, 6, 7), la vortilisma morfologio ne esprimas sian rimedo-ŝparemon per la malmultigo de specioj. La substancisma laborsistemo, ene de kiu la vortilisma morfologio nomata PVM estas provinco, emisias la necesajn biletojn kaj praktikas la aŭsterecon en la principaro de la lingvoteorio egidanta la biletojn. Elementojn de tiu teorio vi trovos ĉe Singh & Starosta (2003) kaj pluaj referencoj tie menciitaj.

5 *Macbeth*, v.5.19-20, permesu ke mi tion citu sen aparta referenco, ne gravas kiun eldonon vi konsultos por kontroli. La frazon mi fuŝtradukas kiel “Morgaŭo kaj morgaŭo kaj morgaŭo / tralamas tra la tagoj de la mondo.” Mi estas nek Kalocsay nek Tonkin; oni aŭtomate indulgos min.

Ĉu mi serioze asertas ke la vorteristoj ne trovos en sia kadro taŭgajn ilojn per kiuj paŭsi miajn movojn? Sur kio mi bazas la daŭran kredon ke la vortilismo pli bone solvas nian problemon?

Sur jenaj faktoj: kvankam de longege Esperanto nutras la konatajn dombestojn *finfine* kaj *plenplena*, kaj kvankam de same longege nia kara lingvo uzas la elementojn *-fine* kaj *-plena* kiel vortofinajn vostojn, tamen – sen ke iu tion rimarku – neniu serioza uzanto de nia lingvo venis al la ideo diri *Ni plenumos tiun tagorderon nur jarfinfine*, aŭ *Ĉiuj rotarianoj estas amplenaj sed s-ino Ikso estas vere ampleplena*. La vortilismo jam dekomence nete distingas verajn vortojn kiel *fine* kaj *plena* disde la supozataj konsisteroj “-fina” kaj “-plena” en *jarfine* kaj *amplena*. Tial estas bagatela tasko por vortilisto prezenti priskribon kiu klarigas la strangecon kaj neuzatecon de *jarfinfine* kaj *ampleplena* – kaj kiu licencnivele permesas tiajn deviojn pro la intima ligiteco inter la substancismo kaj la semiotiko. Se iu vorteristo efektive montros sian doktrinon egala al la vortilismo ĉi-rilate, mi ĉi-pere promesas tuj konvertiĝi al la versio de vorterismo predikata de tiu korifeo ankoraŭ nekonata al mi.

Mi finas per malspecifa danko al la seula publiko kiu en 2017 pacience trasidis mian surpodian prezenton de praversio de la ĉi-supra rezonaĵo, kaj per persona danko al Humphrey Tonkin, kiu sola en tiu salono tuj rimarkis ke mi populisme provas plaĉi al la publiko per trosimpligo de miaj veraj pensoj, kaj kiu petis ke mi prefere malkaŝu la pli rafinitan rezonfadon. Jen la rezulto de tiu lia peto. Mi esperas nur ke li ne bedaŭros ke li tion petis.

Bibliografio

- Dasgupta, P. (2003). Antiopacity and Bangla causatives: a substantivist approach. In R. Singh & P. Dasgupta (Eds.), *The Yearbook of South Asian Languages and Linguistics 2003* (pp.47-70). Berlin & New York: Mouton de Gruyter.
- Dasgupta, P. (2011). *Loĝi en homaj lingvoj: la substancisma perspektivo*. New York: Mondial.
- Kalocsay, K., & Waringhien, G. (1985). *Plena analiza gramatiko (5a korektita eldono)* Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Schubert, K. (1989). An unplanned development in planned languages. In K. Schubert (Ed.), *Interlinguistics: Aspects of the Science of Planned Languages* (pp.249-274). Berlin & New York: Mouton de Gruyter.
- Singh, R., & Starosta, S. (Eds.) (2003). *Explorations in Seamless Morphology*. New Delhi, London & Thousand Oaks: Sage.

Pri la aŭtoro

Dasgupta, Probal (n. 1953), doktoro (lingvoscienco), 1980, Novjorka universitato. Instruis en Novjorko, Sanfrancisko, Melburno, Barlastono, Kolkato, Pune, Hajderabado. Emeritiĝis kiel profesoro el Barata Statistika Instituto, Kolkato, 2018. (Kun)redaktis/as: *Indian Linguistics*, *LPLP*, *Beletra Almanako*. Prezidanto de: UEA (2007-2013), Akademio de Esperanto (2016-22). Honora membro de: Lingvistika Societo de Usono (2004-).

Retadreso: professor.p.dasgupta@gmail.com

ORCID-numero: 0000-0001-9168-7642

About the author

Dasgupta, Probal (b. 1953), PhD (linguistics), 1980, NYU. Has taught in New York, San Francisco, Melbourne, Barlaston, Kolkata, Pune, Hyderabad. Retired as professor from Indian Statistical Institute, Kolkata, 2018. (Co-)edited/edits: *Indian Linguistics*, *LPLP*, *Beletra Almanako*. President of: UEA (2007-2013), Akademio de Esperanto (2016-22). Honorary member of: Linguistic Society of America (2004-).

সংক্ষিপ্ত লেখকপরিচিতি

দাশগুপ্ত, প্রবাল (জ. ১৯৫৩), পিএইচডি (ভাষাতত্ত্ব), ১৯৮০, নিউ ইয়র্ক বিশ্ববিদ্যালয়। অধ্যাপনা নিউ ইয়র্কে, স্যান ফ্রানসিস্কোয়, মেলবোর্নে, বারলাস্টনে, পুণেয়, হায়দরাবাদে। ২০১৮ সালে ভারতীয় রাশিবিজ্ঞান বিদ্যায়তন (কলকাতা) থেকে অবসরগ্রহণ।(সহ-)সম্পাদনা: *ইণ্ডিয়ান লিঙ্গুইস্টিক্স*, *ল্যাঙ্গুয়েজ প্রবলেমস অ্যাণ্ড ল্যাঙ্গুয়েজ প্ল্যানিং*, *বেলেত্রা আলমানাকো*। সভাপতিত্ব: বিশ্ব এসপেরান্তো সংগঠন (২০০৭-২০১৩), আকাদেমিও দে এসপেরান্তো (২০১৬-২০২২)। সাম্মানিক সদস্যপদ: লিঙ্গুইস্টিক সোসাইটি অভ আমেরিকা (২০০৪-)।